

Hordeo kaj lupolo,
tankardo kaj tostvoko,
lingvoj simbolo de uni-
versaleco, kaj la devizo:

«Per manoj farita, ani-
me gistata, ĝuota de U-
kor» — jen hejmetia
biero el Portugalio.

amasto

anime gistata
farita per manoj
ĝuota de la koro

11 MESTRES
CERVEJEIROS

NiaBulteno

ISSN:0871-9241

JANEIRO-MARÇO 2012 JANUARO-MARTO • Numero 93

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-^oA, PT-1500-239 LISBOA • +351 +217 141 359 • asocio@esperanto.pt • www.esperanto.pt

9-a IRO, Sezimbore:

**improviza
plongado!**

Pri apenaŭ ne fiasko ĉipaske legu el

pĝ.9

**Oporta bando
koncertas en
esperanto**



Okaze de maja turneo en
Lisbono, P.E.A. ekrilatis
kun la etno-fuzia muzik-
istaro Rakia.

Pĝ.3

1972-2012: nia asocio 40-jara
1887-2012: nia lingvo 125-jara!

Oktobre al Palmelo Vortaroj de niaj lingvoj

Nia 26-a jara renkontiĝo okazos laŭplane
komence de oktobro 2012 en la ĉarma sud-
lisbonia kastelurbo Palmelo.

Pĝ.3

Entute 57 portugallingvaj esperanto-vorta-
roj, de 1892 ĝis nun, el kiuj 13 nia-lande;
ilin verkis 21 aŭtoroj. Liston sur

pĝ.5-8

Nia dojeno **Américo Esteves de ALMEIDA**: 1908-2005 pĝ.10

interŝanĝnumero

n^o de socio
ult. quoto paga
lasta kotizpago
foto

DESTINATARIO:

REMETENTE:
Associação Portuguesa de Esperanto
Rua Dr. João Couto, 6-r/c A
PT-1500-239 LISBOA
PORTUGAL

HOMOJ:

Jen forpasis nia dojeno

Naŭdek-sep-jara mortis en dec. 2005 (*) **Américo Esteves de ALMEIDA** (★0899), esperantisto ekde junaĝo, aktivinta en lisbonaj rondoj; pli ĵuse li vizitadis la sidejon unu fojon jare ĝis 1997. **AMT+ASA+MPA**



Surfote ekskurseto apud Barreiro, ĉ. 1955: dekstren, staras nomoto, Valdomiro Belo FARINHA, **Américo Esteves de ALMEIDA**, kaj António da Silva ALMEIDA; kaŭras Rocha da COSTA, Ventura ANTUNES, kaj Karlo Ferdinando (Carlos Fernando COTOVIO); fone lia VW-furgono.

HOMOJ:

Revulo firmkrura

António FERREIRA mortis 87-jara en 2007 (*), sed jam en 1998 lia esperanta agado ĉesigis (★0872), pro draste malboniĝinta sanstato. Li laste laboris kiel fakturricevisto, kio lin irigis tuttage tra Lis-


bono: «Miaj kruroj estas ankoraŭ kiaj de sepjara bubo, sed kiam mi emeritiĝos, mi ne daŭros longe», li iam aŭguris. Li kunlaboris pri diversaj sidejaj taskoj dum la 1980-aj kaj 1990-aj, i.m.a. pri la parlamenta peticio en 1991 (NB60:6-9). Lia pasio estis la aritmetiko (eĉ kun memagnoskita manko de matematika

* Eksciita nur en 2012: Pri Esteves de ALMEIDA per municipa tombejedikto (Journal de Sintra 2011.11.25: 2); pri António FERREIRA per familiana sciigo.

LERNADO:

Kurse plui

Eĉ kontraŭ la pesimismo de ties iniciatinto (NB91:25), la sidejaj kursoj tre sukcese pluas (NB92:9), jam (majmeze) je la dek-unua leciono: La unua-nivela klaso, tre ŝata te instruata de Nádia PENAS, ne nur ne spertis la kutimajn forlasojn sed eĉ kreskis, kun novaj lernantoj aniĝintaj jam postkomence: entute nun dek du. La dua nivelo, kiun instruas Luri GASPAS, ankaŭ pluas, kun la sama komenca klaso el du lernantoj. Laŭplane plenumiĝos fine de septembro la kompleto el 36 h da instruado en ambaŭ kursoj. Finexzameni kaj diplomigo okazos jarfine. **AMT**



kleroj), kaj patentitan elpensajon sian (kiu garantius ĉiusemajnajn plenkromojn de loterio kaj futbalvetoj) li nomis *Cri-vo Esperantista*. **AMT**

ARANĜOJ:

Malpelmele palmelen!

Dum la estraro penis eviti la ĵusajn problemojn (Sezimbro, *Espinho, Figueira da Foz*) pri manko de subteno el la loka registaro okaze de niaj aranĝoj, pretiĝis refoje Miguel Boieiro (mem iama urbestro) peri niajn dezirojn al akceptemaj municipestraroj elinterlia vasta kontaktaro. Sekve elektigis Palmelo (*Palme-la*) urbeto kreskinta ĉirkaŭ kastelo, bonege situanta apud Lisbono (8 km norde de Setublo), la maro, du naturparkoj, vitejoj kaj vinejoj. La renkontiĝo okazos planate la unuan semajnfino de oktobro; programo preparatas. Detalojn en NB94. **AMT**



En 2012.05.13, kadre de la festivalo *Máscara Ibérica*, prezentigis en la lisbona *Rossio* la etno-fuzia oportuna bando **Rakia**. Vigle kaj rave sonis i.a. violono, baterio, tamburinego, kaj folkloro 12-korda gitaro (*viola campaniça*) por kvar kantoj — inter ili, kiel bisajo, la **esperantlingva** "*Grand Boutique*", kun teksto el fama portugala verkisto Miguel TORGA ("*Súplica*") laŭ improviza traduko fare de bandano Diana AZEVEDO (↑), inspirite de simila sperto de la Oporta Pupteatro en 1999. Ŝin kaj la ĉefkantiston, Fabíola AUGUSTA (↗), intervjuis kulise post la koncerto P.E.A.-anoj MARTINS-Tuválkin kaj Jaime CORREIA. La mirindaj voĉoj kiuj ĵus sorĉintis la spektantaron, sia-vice iĝis publiko al pliaj sciigoj pri tiu lingvo kiun ili avidas uzadi, sed apenaŭ konas. Jam la antaŭan semajnon rimarkis asocioano Cremilde CORREIA la mension de esperanto en la festivalprogramo, el kio sekvis kontakto fare de la menciita estrarano: «Esperanto estas por ni simbola afero», sed «ni volas perfektigi niajn tekstojn kaj nian elparolon!» **AMT**

ASOCIO:

Ĝ.A. 2012

La 31-an de marto 2012 kunvenis la Ĝenerala Asambleo de Portugala Esperanto-Asocio en sia sidejo, sub prezido de sekretario Rui VALÉRIO kaj kun la ĉeesto de ok asocianoj. Post aprobo de la estrara raporto pri la jaro 2011, oni unuvoĉe aprobis kaj akklamis proponon de la estraro pri membrigo de Olga ALMEIDA kiel honora membro (NB92:3). **IFG**

SIDEJO:

Ĉarpentaĵoj

Nia viglega veterano kaj elserĉpreta ĉarpentisto Pedrosa ALVES laŭpete volonte preparis du pliajn laboraĵojn por sideja plibonigo: La libro-vendejo havas ekde la 14-a de majo tri fortikajn bretvicojn superstable, kio liberigis valoran spacon aliloke. Dume, la norda muro de la oficejo, ruinigita de najbara kranliko kiu faligis ĝian stukon, estos tegita ĝis brustalto per murplinto el rabotita pinligno kun lino-lea trempo. Krome, akiriĝis subfenestra bretŝranko kaj subŝrankaj kofroj por la saloneto. **AMT**

KULTURO:

Ĉe l' banano en Vimarano

Artista grupo «provoke» nomata Musa paradisiaca (sciencia nomo de la bananarbo) organizis en marto 2012 dusesian eventon en la eksuzino ASA kadre de la eventaro Eŭropa Kulturĉefurbo kunokazanta en Guimarães (Vimarano, nordokcidenta Portugalio). Ili petis de nia asocio ĉeeston de esperantisto por anigo al «simbola» spektantaro, kaj sekve ĉeestis Carlos Humberto MOREIRA, kiu raportas:

Merkrede (la 26-an), ili pensis pri kunvenoj inter 6 aŭ 7 homoj por diskuti pri «La Tempo». La partoprenintoj en la diskutado ne estis speciale lertaj, precipe la lokaj partoprenintoj. Mi alportis kelkajn librojn kaj revuojn en/pri nia lingvo kiuj interesis ĉefe la organizantojn kaj iliajn amikojn.

Vendrede (la 30-an), antaŭ pli granda publiko (ĉ. 15 homoj), aperis la itala kunvenanto, prof. Marco PASI, el Milano sed loĝanta en Amsterdamo, kiu, kiel studemulo pri Fernando PESSOA, volis ke esperantisto legu du poemojn tradukitajn en esperanton.

Mi refoje elmontris esperanto-librojn, muzikkompaktdiskojn kaj mi profitis la okazon por ekjeti la ideon organizi, septembre aŭ oktobre, kelkajn debatojn pri esperanto, kun grava ekspozicio de libroj kaj aliaj aĵoj por disvastigado de nia lingvo en la spaco de Guimarães — Ĉefurbo de la Kulturo. Mia ideo estis tre bone akceptita kaj organizantoj Miguel FERRÃO kaj Eduardo GUERRA promesis kontakti P.E.A.n por preparoli pri tia afero. **CHM**

BIBLIOTEKO:

Librojn plu kaj pli

Plu daŭras (NB91:19) la reordigado de la asocia biblioteko: Nun, unuopa ekzistkonfirmo de ĉiu libro kaj prinoto de ties tema klasigo — tion daŭrigas volontule pluraj sidejanoj: A. S. ALMEIDA, Wilson BRÍGIDO, A. MARTINS-TUVÁLkin, Eduardo CRISPIM, Marta MARTINS, Suzete dos SANTOS, Neza ANTUNES, kaj Maria RAPOSO (ĉi tri lastaj estas kurslernantoj: pĝ. 10): Tiu fazo baldaŭ finiĝos kaj sekvos enkomputiligo de la tuto, aldono de dume ricevitaĵoj novakiraĵoj, kaj definitiva ordigado. Dume, nova regularo pri pruntoj studatas.

Novaj volumoj

Krom diversdevenaj donacoj po etaj kvantoj, nia biblioteko (ek)ricevis komence de 2012 tri signifajn grandkvantajn donacojn: Unu estas ĉiusemajna libro-livero de po dudek el A. S. ALMEIDA, kiu zorge mem aldonadas ilin al la sliparo. Dua venis el Jorge BRANCO (ree nia sola kunasocio en Estremozo — kp. NB92:10), kiu alsendis plurajn librojn kaj gazetojn. La tria estas heredaĵo el la longtempa movadano Frazão de FARIA, forpasinta en 2001 (NB78:6): 284 volumoj kiuj dankinde aldoniĝis al nia libraro. **AMT+WB**

HOMOJ:

El du kontinentoj


Ĉeestis nian sidejan sabaton la lastan de aprilo argentina esperantisto **Claudio Jorge Hess**. La trian semajnon de majo revizitis Lisbonon kaj nian sidejon angola esperantlingva lignskulptisto **José Baxombana** (NB92:4). **AMT**

RRUS

ARANĜOJ:



La 8-a IRO, paske 2012 en Portugalio, nur iel okazis ĉar unusola eksterlandano decidis tamen veni, malgraŭ neklareco de la programo kiel anoncita. Tiu estis kataluno Ramón Riús, kiu raportas ĉiapaĝe. Kiel li skribis en la asocia gastlibro, «neplanitaj eventoj, se kore faritaj, ankaŭ povas sukcesi». (La sekvan IROn, en 2013, organizos hispana HEJS.)



■ Ramón Riús

Lisbono havas la romantismon de la tramoj, la poetoj, la fadoj kaj la karaveloj. Ĝi ankaŭ suferas pro la “realismo” de la ekonomia interveno de la faktaj povoj de Eŭropo. Mi povis reveni al Lisbono kaj plibone koni ĝin dank’ al Portugala Esperanto-Asocio kaj al unu el ties estroj — idealisto kiu suferas pro sialanda situacio — António MARTINS. Li gastigis min dum tiuj tagoj kiam okazis la intima IRO — ĉe la sidejo de la Asocio. Kune ni vizitis la urbon, promenis tra malsamaj kvartaloj kaj mi konatiĝis kun lokaj kutimoj, manĝaĵoj kaj ankaŭ kun denaska esperanto-parolantino, Marta (↑).

Sabate, la 7-an de Aprilo, ni fine iris al Sesimbra, kie ni vizitis la kastelon kaj defiante la malaltan temperaturon ni faris, kune kun aliaj samasocioj, la unuan plonĝadon sur la preskaŭ malplena strando. Al mi, do, eblis paroli esperanton kaj ankaŭ la portugalan kiam mi tutsole travagis la urbon. Kvankam la suno malofte brilis, tiuj tagoj estis tre lumaj. ■

VENDEJO:

Libroj nun pli kostaj!

La 5-an de majo, dum sideja laborkunveno kun A. S. ALMEIDA, W. BRÍGIDO, kaj A. MARTINS, 295 el la 413 varoj de nia vendejo (ĉefe libroj) ricevis novan prezon. Temis ĉefe pri “normaligo” de tro malgrandaj valoroj kiuj ial eskapintis antaŭajn aktualigojn:

Entute 238 prezoj pli-kostiĝis, averaĝe je 245%, sed ĉe 57 varoj la prezo eĉ malpliĝis (83%). Fine, 29 el la analizitaj varprezoj restis senŝanĝaj.

Entute la plenvenda ebla enspezo kreskis de 8 222,81 € al 10 918,96 €. Ĉiujn ŝanĝojn aprobis poste vendejestro R. Q. VALÉRIO, neĉeestinta pro persona afero. La nova katalogo haveblas laŭpete kaj ĉe <http://esperanto.pt/dok/katalogo.pdf>. **AMT+RQV**



Baldaŭ ankaŭ la 15 **filatelaj varoj** ekhavas novan prezon, agorditan al ties valoro en poŝtmarkaj rondoj, laŭ aprezo de J. PINA kaj A. CARDOSO. (↑ Bulgara p.m. pri la U.K. 1978, ★00.105.)

- Chave do Esperanto*. Lumo, Lisboa (PT) 32p. 15×14 cm²: Kun gramatiko. Rev. pli-long. eld.; 2500 radikoj kaj supl. pri komercaj vortoj.
- ☒←☆ Alberto Couto FERNANDES (1922): *Esperanta Radikaro (Oficialaj Radikoj) kun Portugala traduko*. O Norte, Rio de Janeiro (BR) 1-a eld. 82p. 13×7×30 cm³ ★B 1205: Enhavas nur oficialajn vortojn kaj afiksojn.
- ☒→☆ Tobias Rabelo LEITE (1913): *Diccionario Portuguez-Esperanto*. Hachette, Paris (FR) 1-a eld. 417+5p. 15×10×2,5 cm³ ★B 1482.
- ☒←☆ Tobias Rabelo LEITE (1910): *Vortaro Esperanta-Portugala / Diccionario Esperanto-Portuguez*. Hachette, Paris (FR) 1-a eld. 176p. 15×10×1,5 cm³ ★B 1482, 0340.
- ☒→☆ José Augusto PROENÇA (1909(?)): *Diccionario Portuguez-Esperanto*. Almeida e Sá, Porto (PT) 16 000 kapv. 293+28p. 19×14 cm² ★B 0159.
- ☒←☆ José Augusto PROENÇA (1908): *Diccionario Esperanto-Portuguez*. Almeida e Sá, Porto (PT) xiii+137+28p. 19×14 cm² ★B 0159: Kun resumo gramatika.
- ☒←☆ Herbert Frederich HÖVELER (=“E. Ĉefeĉ”) (1907): *Chave do Esperanto*. Internacia Propagandejo Esperantista, London (GB) 1-a eld. 26p. 11×7 cm²: Kun gramatiko; 1837 radikoj.
- ☒↔☆ Manuel Ribeiro da Costa e ALMEIDA (1898): *Vocabularios*. Herminio, Gouveia (PT) 2-a eld. 216p. 16×12 cm²: En: *A Lingua Universal Esperanto Methodo completo comprehendendo dois vocabularios segundo a edição franceza de M. L. de Beaufront traduzido e coordenado por Manuel Ribeiro da Costa e Almeida*. ★B 2957.
- ☒↔☆ Manuel Ribeiro da Costa e ALMEIDA (1896): *Vocabularios*. Herminio, Gouveia (PT) 1-a eld. 216p. 16×11 cm²: En: *A Lingua Universal Esperanto Methodo completo comprehendendo dois vocabularios segundo a edição franceza de M. L. de Beaufront traduzido e coordenado por Manuel Ribeiro da Costa e Almeida*.
- ☒↔☆ Jayme Heinlein FERREIRA (1892): *Diccionario Esperanto-Portuguez Diccionario Portuguez-Esperanto*. W. Tümmel, Nuremberg (DE) pĝ.: 21-74 16×11 cm²: Kun supl. pri nomoj de monatoj, popoloj, mezuroj, valutoj, sezonoj kaj ĉefurboj. En: *A Lingua Universal “Esperanto” Methodo completo comprehenendo dois vocabularios segundo a edição alemã do Dr. Luis Samenhof traduzido e coordenado por Jayme Heinlein Ferreira*. ★B 2175.

Fontoj kaj notoj:

Kompilo surbaze de la listoj <http://www.uea.org/dokumentoj/bib/portugala.html> kaj http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-portugalaj_vortaroj, kun aldonoj kaj korektoj fare de A. MARTINS-Tuválkin, João José SANTOS, Túlio FLORES, A. S. ALMEIDA, kaj Iuri GASPAS. Estis konsiderataj nur vortlistoj libere konsulteblaj (en komputila platformo) aŭ (papere) en plena alfabeto ordo: mankas do korektiloj, konversaciaj vortaroj, kaj frazlibroj; estis konsiderataj ankaŭ “vortaroj” publikigitaj kiel aneksoj aŭ ĉapitroj de pli vastaj verkoj, se leksikografie kompletecaj kaj ĝeneralaj: do mankas fakterminaroj, glosaroj, k.s. Aldonoj kaj korektoj bonvenas. Aktuala versio ĉe <http://esperanto.pt/dok/vortaroj.pdf>. **Signoj:** “☒” portugala lingvo, “☆” esperanto. **Identigkodoj ĉe P.E.A.:** “★v” mendkodo en la Libro-Servo (elĉerpita se prezo mankas); “★B” Biblioteko (demandu pri prunteblo ĉe biblioteko@esperanto.pt). ■

LINGVO:

Portugallingvaj esperanto-vortaroj

- ☒←☆ João José SANTOS (2012(?)): *Dicionário Didático Esperanto-Português*. La Karavelo, Estremoz (PT); Juiz de Fora (BR): Aperonta.
- ☒↔☆ (anon.) (2012*): *Lernu: Eo-Português / Português-Eo*. E@i (US): Havebla en <http://lernu.net/> (viz. 2011.07.29). *Kreita en 2002, aktualigata. Dudirekteco aŭtomata.
- ☒↔☆ (anon.) (2012(?)*): *Majstro: Multlingva vortaro*. Majstro-Aplikaĵoj (NL) 15 913 kapv.: Havebla en <http://www.majstro.com/> (*viz. 2012.05.17; kredato nek.). Dudirekteco aŭtomata.
- ☒↔☆ (plur.) (2012*): *Viki-vortaro / Wiktionary*. Wikimedia Foundation (US) 7098 kapv.: Havebla en <http://eo.wiktionary.org/>; portugala vortlisto en <http://eo.wiktionary.org/wiki/Kategorio:PT> (viz. 2012.05.17). *Kreita en 2004.05, aktualigata. Dudirekteco aŭtomata. Pluraloj, verbformoj, k.s. vortvarioj aparte listigitaj.
- ☒↔☆ (plur.) (2012*): *Reta Vortaro*. ReVo (DE) 15 170 kapv.: Havebla en <http://www.reta-vortaro.de/>; portugala vortlisto en http://www.reta-vortaro.de/revo/inx/lx_pt_a.html (viz. 2011.07.29). *Kreita en 1997, aktualigata. Dudirekteco aŭtomata.
- ☒↔☆ Túlio FLORES (2012*): *Dicionário de Túlio Flores: Português-Esperanto / Esperanto-Português*. Brazilo.org (BR) 56 612 kapv.: Havebla en <http://vortaro.brazilo.org/vtf/> (viz. 2011.07.29). *Kreita en 2005, aktualigata. Dudirekteco aŭtomata.
- ☒→☆ António da Silva ALMEIDA (2012): *Dicionário Português-Esperanto*. P.E.A., Lisboa (PT) 2-a eld. 650p. 23×15 cm² ★v 04.037: 30,00 € ISBN: 978-972-9471-37-7: Brunruĝa kovrilo.
- ☒←☆ António da Silva ALMEIDA (2010): *Dicionário Esperanto-Português*. P.E.A., Lisboa (PT) 2-a eld. 365p. 23×15 cm² ★v 04.032: 26,00 € ISBN: 978-972-9471-38-4: Blu-verda kovrilo.
- ☒←☆ Sylla CHAVES (2008): *Oportuna Poŝvortaro Esperanta-Portugala*. Oportuno, Rio de Janeiro (BR).
- ☒↔☆ Carlos Augusto Guimarães DOMINGUES (2003): *Vocabulário Português-Esperanto Esperanto-Português*. BEL, Brasília (BR) 3(?) a eld.
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA (2002): *Dicionário Esperanto-Português*. FEB, Rio de Janeiro (BR) 8-a eld. 159p. 18×13×1 cm³ ★v 04.002: 10,00 € ★B 1583 ISBN: 85-7328-121-9: Ruĝa kovrilo. Sen enhavaj ŝanĝoj ekde la 2-a eld. Ekzemplernombro de ĉiuj eldonoj: 39 500.
- ☒↔☆ Edgard Monteiro MACHADO (2002): *Vocabulário de bolso Português-Esperanto / Esperanto-Português*. Lorenz, Rio de Janeiro (BR) 1-a eld. 113+67p. 15×10 cm² ISBN: 85-8698423-X: Dufaca (du ŝajnaj antaŭoj).
- ☒←☆ Sylla CHAVES (1999): *Dicionário do principiante Esperanto-Português*. EASP, São Paulo (BR) 80p. 21 cm.
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA (1997): *Dicionário Esperanto-Português*. FEB, Rio de Janeiro (BR) 7-a eld.: Sen enhavaj ŝanĝoj ekde la 2-a eld.
- ☒→☆ Allan Kardek Afonso COSTA (1997): *Novo dicionário Português-Esperanto*. FEB, Brasília (BR) 4-a eld. 552p. 23×18 cm² ISBN: 85-73281-20-0: Ekzemplernom-

- bro de ĉiuj eldonoj: 16 mil.
- ☒←☆ António da Silva ALMEIDA (1997): *Dicionário Esperanto-Português*. P.E.A., Lisboa (PT) 1-a eld. 305p. 21×15×2 cm³ ★V 04.020 ISBN: 972-9471-32-0.
- ☒→☆ António da Silva ALMEIDA (1997): *Dicionário Português-Esperanto*. P.E.A., Lisboa (PT) 1-a eld. 35 000 kapv. 535p. 21×15×3 cm³ ★V 04.021 ISBN: 972-9471-33-9.
- ☒↔☆ Carlos Augusto Guimarães DOMINGUES; Sylla CHAVES (supl.) (1995): *Vocabulário Português-Esperanto Esperanto-Português*. BEL, Brasília (BR) 3(?) -a eld. 6000 kapv.
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA (1995): *Grande Dicionário Esperanto-Português*. K.K.E., Rio de Janeiro (BR) 2(?) -a eld. 3(?) -a repres.
- ☒→☆ Allan Kardek Afonso COSTA (1994): *Novo dicionário Português-Esperanto*. FEB, Brasília (BR) 3-a eld. 544p. 23×18 cm².
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA (1993): *Dicionário Esperanto-Português*. FEB, Rio de Janeiro (BR) 6-a eld. : Sen enhavaj ŝanĝoj ekde la 2-a eld.
- ☒↔☆ Carlos Augusto Guimarães DOMINGUES; Sylla CHAVES (supl.) (1989): *Vocabulário Português-Esperanto Esperanto-Português*. BEL, Brasília (BR) 2(?) -a eld. 235p. 19×14 cm² ★V 04.012.
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA (1989): *Dicionário Esperanto-Português*. FEB, Rio de Janeiro (BR) 5(?) -a eld. : Sen enhavaj ŝanĝoj ekde la 2-a eld.
- ☒→☆ Allan Kardek Afonso COSTA (1989): *Novo dicionário Português-Esperanto*. FEB, Brasília (BR) 2-a eld. 548p. 23×18 cm².
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA; Sylla CHAVES (supl.) (1989): *Grande Dicionário Esperanto-Português: com Suplemento*. K.K.E., Rio de Janeiro (BR) 2-a eld.; 1-a pres. 12 100 kapv. 576p. 21 cm ★V 04.030 : 2100-vorta suplemento.
- ☒→☆ Allan Kardek Afonso COSTA (1987): *Novo dicionário Português-Esperanto*. FEB, Brasília (BR) 1-a eld. 544p. 23×18 cm² ★V 04.004.
- ☒↔☆ Carlos Augusto Guimarães DOMINGUES (1984): *Vocabulário Português-Esperanto Esperanto-Português*. BEL, Brasília (BR) 2(?) -a eld. 235+48p.
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA (1982): *Dicionário Esperanto-Português*. FEB, Rio de Janeiro (BR) 4(?) -a eld. 160p. 18×13 cm² : Sen enhavaj ŝanĝoj ekde la 2-a eld.
- ☒↔☆ Carlos Augusto Guimarães DOMINGUES (1978): *Vocabulário Português-Esperanto Esperanto-Português*. BEL, Rio de Janeiro (BR) 1-a eld. 6000 kapv. 235p. 19×14 cm² ★B 0193.
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA (1976): *Dicionário Esperanto-Português*. FEB, Rio de Janeiro (BR) 3-a eld. 159p. 18 cm : Sen enhavaj ŝanĝoj ekde la 2-a eld.
- ☒←☆ Maŭro de SASSI (1976): *Vocabulário: 1000 palavras freqüentes*. La Juna Penso, Laroque-Timbaut 47 (FB) 1000 kapv. 24p. 21×15 cm² : Kun gramatiko. En: *Esperanto em 24 páginas*.
- ☒←☆ Herbert Frederich HÖVELER (=“E. Ĉefeĉ”) (1975): *Chave do Esperanto*. P.E.A., Porto (PT) 48p. 12×8×0,3 cm³ ★V 04.001: 0,25 € ★B 1086 : Kun gramatiko.
- ☒↔☆ José dos Reis PIRES (=“Apolonius”); Alves de MOURA (rev.) (1974): *Turista vortaro : Português-Esperanto / Esperanto-Português*. P.E.A. / Cruz, Lisboa (PT) 1-

- a eld. 198+75p. 14×10×1 cm³ ★V 04.003 (blanka), 04.034 (blua), 04.035 (ruĝa), 04.036 (verda): 3,00 € ★B 1803 ISBN: 972-9471-22-3: Plasta kovrilo; dufaca (du ŝajnaj antaŭoj); ekzistas en 4 kovrilkoloroj, sen enhava dif.
- ☒←☆ Adelino Franco SIMÕES (1971): *Vocabulário Esperanto-Português : Fundamenta kaj Akademia Vortaro*. (aŭtoro): Lourenço Marques (=Maputo) (MZ) 1-a eld. 10 000 kapv. 64p. 21×14,8×0,5 cm³.
- ☒→☆ Ismael Gomes BRAGA (1965): *Dicionário Português-Esperanto*. K.K.E., Rio de Janeiro (BR) 2-a eld. 363p. 19×14 cm² .
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA (1964): *Grande Dicionário Esperanto-Português*. K.K.E., Rio de Janeiro (BR) 1-a eld. 28 000 kapv. 501p. 19×14×3 cm³ ★B 2413 : Kun supl. pri propraj nomoj.
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA (1961): *Dicionário Esperanto-Português*. FEB, Rio de Janeiro (BR) 2-a eld. 160p. : Kelkaj korektoj kaj aldonoj.
- ☒←☆ Herbert Frederich HÖVELER (=“E. Ĉefeĉ”) (1957): *Chave do Esperanto*. BEL / I.G.B.E., Rio de Janeiro (BR) 2500 rad. 42p. 11×7×0,3 cm³ ★B 1085 : Kun gramatiko.
- ☒←☆ Ismael Gomes BRAGA (1956): *Dicionário Esperanto-Português*. FEB, Rio de Janeiro (BR) 1-a eld. 160p. 16×12×1,5 cm³ ★B 0099 : Kun supl. pri vortoj similaj al aŭ egalaj al iliaj portugalaj ekvivalentoj.
- ☒→☆ Ismael Gomes BRAGA (1954): *Dicionário Português-Esperanto*. K.K.E., Rio de Janeiro (BR) 1-a eld. 20 000 kapv. 300p. 19×14×2,5 cm³ ★B 0160.
- ☒←☆ Alberto Couto FERNANDES (1947): *Dicionário de Bólso Esperanto-Português (com as terminações, afixos e radicais oficiais do Esperanto)*. LEB, Rio de Janeiro: (BR) 4-a eld. 79p. ★B(?): Enhavas nur oficialajn vortojn kaj afiksojn.
- ☒←☆ Alberto Couto FERNANDES; Carlos DOMINGUES (1945): *Dicionário Esperanto-Português*. FEB, Rio de Janeiro: (BR) 264p. 19×14×2 cm³ ★B 1033 : Kun supl. pri mallongigoj kaj propraj nomoj geografiaj, historiaj, mitologiaj, literaturaj kaj personaj.
- ☒←☆ Jozefo JOELS (1940): *Dicionário Completo Esperanto-Português*. FEB, Rio de Janeiro (BR) 9000 kapv. 278+2p. 16×12×2 cm³ ★V 04.005 (?) ★B 1596 : Kun supl. pri 77 vortoj enhavantaj la sufikson -um- kaj supl. pri propraj nomoj.
- ☒←☆ Alberto Couto FERNANDES (1938): *Vocabulário Esperanto-Português (Raizes Officiais) / Esperanta Radikaro (Oficialaj Radikoj) kun Portugala traduko*. Pongetti, Rio de Janeiro (BR) 3-a eld. 69p. 19×13×0,5 cm³ ★B 0317 : Enhavas nur oficialajn vortojn kaj afiksojn.
- ☒→☆ Alberto Couto FERNANDES; Carlos DOMINGUES; Luiz Porto Carreiro NETO (1936): *Dicionário Português-Esperanto*. Imprensa Nacional, Rio de Janeiro (BR) 25 000 kapv. xviii+488p. 19×14×3 cm³ ★B 0349 : Kun supl. pri propraj nomoj geografiaj, historiaj, mitologiaj, literaturaj kaj personaj.
- ☒←☆ Herbert Frederich HÖVELER (=“E. Ĉefeĉ”) (1934): *Chave do Esperanto*. Paolet, San Vito / San Vít PN (IT) 2-a eld. 42p. 11×8 cm² : Kun gramatiko.
- ☒←☆ Alberto Couto FERNANDES (192X): *Esperanta Radikaro (Oficialaj Radikoj) kun Portugala traduko*. (BR) 2-a eld. : Enhavas nur oficialajn vortojn kaj afiksojn.
- ☒←☆ Herbert Frederich HÖVELER (=“E. Ĉefeĉ”); Saldanha CARREIRA (rev.) (1923):